



FLAM-ANALIZADO

FLAM-analizoj permesas pritakson de difinita organizo kaj situacio por trovi ĝiajn pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Tion ni faras pere de kvar kategorioj:

Fortoj: ene de la koncerna organizo
Lamaĵoj: ene de la koncerna organizo
Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo
Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo


Do, Fortoj kaj Lamaĵoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj povos mem regi aŭ influi. Kontraste Avantaĝoj kaj Minacoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj apenaŭ povas influi aŭ ŝanĝi, sed kiujn ili nepre devas atenti kaj kompreni, ĉar ili trudas sin el la ĉirkaŭaĵo en kiu la esperantistoj devas prezenti sin.

Analizado kompreneble konsistigas nur la komencan fazon – necesas el tiu analizo plue labori por proponi vojojn por solvoj. Ni faras tion laŭ la sekva skemo:

Evoluigi la Fortojn
Kuraci la Lamaĵojn
Ekspluati la Avantaĝojn
Kontraŭi la Minacojn

Laŭ la komencliteroj, la solvoserĉa ekzerco nomiĝas **EKEK** !

En analizoj faritaj antaŭ decembro 2015, la paŝo de EKEK ne ekzistis kaj estas kreinda!



ANALIZO pri la kulturcentro Greziljono

Temo de la nuna analizo:

Perspektivoj por la pluvivo kaj prospero de la centro en la monde konata kastelo.

Evento:

Greziljono; la 15a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) kaj la aŭtuna kursaro.

Dato, loko, gvidanto:

La 25a kaj 31a de oktobro, 2015 en Greziljono, Francio; gvidis Stefan MacGill.

Partoprenantoj kaj daŭro:

15 seminarioj en AMO, kiuj faris la analizon dum ĉ. 90 minutoj.

FORTOJ

- Agrabla naturplena tereno; E-etoso facile krebla
- Kuirado, inkluzive de vegetara manĝado
- Loĝigo eblas por 55 homoj (+30 tende)
- Historio – bone konata
- Kasteloj de Loiro proksimaj
- Aro da spertaj instruistoj diverslandaj.
- Bona retejo – kunveturiga mapo kaj konigo de ofertoj
- Loĝejoj por deĵorantoj ekzistas.
- Konstata deĵoranto dum jarparto (apr-okt)

- Estas ne-espistaj luantoj de la kastelo.
- Konatiĝo kaj kontaktoj kun urbaj instancoj en Baugé ks.
- Ampleksa libroservo kaj biblioteko. (stoko €10K)
- **FORTOJ – kiel Evoluigi ilin?**
 - ❖ Verkindaj, vidu fine pri solvoj

LAMAĴOJ

- Nefacile atingebla; Tro da krokodilado, ĉefe pro mikso de niveloj.
- Altaj funkciigaj kostoj, kompare kun aliaj eventoj sencentraj.
- Loĝigo nesufiĉe komforta por iuj (bruoj, strigoj ☺)
- Eksterlandaj malplias dum lastaj jaroj
- Malsufiĉaj helpantoj; loĝlokoj por helpantoj bonigendaj – neuzeblaj vintre.
- Nesufiĉa klientaro spite la bonan informadon.
- Dezirindeco de tutjara surloka deĵoranto.
- Preskaŭa fermiĝo tra la vintraj monatoj – nesufiĉa klientaro
- La luado al eksteruloj povus esti evoluigita – ne sufiĉaj laborfortoj.
- Nekapablo plekti urbanojn sufiĉe en la agadoj de la kulturcentro.
- La hejtsistemo ĉesas funkcii ekde -4 gradoj (silvestro kutime pli varmas ol tio).

LAMAĴOJ – kiel Kuraci ilin?

- ❖ Verkindaj, vidu fine pri solvoj

AVANTAĜOJ

- Kapitalo ekzistas, sed ne sufiĉe por la tegmentaj bezonoj.
- Eblo ludi rolon loka
- Registrita por povi akcepti infangrupojn; eblo logi alternativajn asociojn
- Ebloj ĉerpi fortojn el civilaj servoj (ŝtata subteno por senlaboruloj)
- Subteno de E-instancoj multlande.
- Reta anoncado – tujaj kaj variaj komuniko-kanaloj
- Verdaj spacoj – multe pli ekspluateblaj
- “Verda vojo” Eŭropo promenvoja programo (publike laŭireblaj padoj) ĉe la malnova fervojo, kiu iam iris laŭ unu rando de la kastela tereno.

AVANTAĜOJ – kiel Ekspluati ilin?

- ❖ Verkindaj, vidu fine pri solvoj

MINACOJ

- Tegmento bezonos riparon ene de dek jaroj – necesas kapitalo €400.000
- Limigo pri rekonstruado pro la historia valoro de la kastelo.
- Malkreskanta-popolo’ aĝigo de la E-publiko
- Perdo de pagipovo en la kontinento kaj mondo – percepto – timo pri estonto
- Financado ekstera por helpantoj nefacila.
- Renkontiĝeja oferto kreskis – en FR kaj alilande.

MINACOJ – kiel Kontraŭi ilin?

❖ Verkindaj, vidu fine pri solvoj

Ideoj por solvoj

- Afiŝoj – elŝuteblaj, sed nesufiĉe uzataj.
- Konigo de novaj kostefikaj ebloj vojaĝi al Greziljono el eksterlando.
- Revivigi la ĝemelurban rilaton Bauge-Kesselbach (DE).
- Evoluigi la indikadon de padoj kaj kreskaĵoj en pluraj lingvoj.
- Eluzi pli komplete la akvoretan kaj similajn naturajn trezorojn.
- Funkciigi alternativajn teknologiojn: perma-agrikulturo. Purigi akvon per plantoj.
- Starigi rilatojn kun ekologiaj grupoj, skoltaj ks.
- Trovi spertulojn pri subvencipetado por ekologiaj projektoj.

FLAM-ANALIZOJ

FLAM 1:	Junio 2014	Pri la movado en Bulgario (farita ekster la kadro de AMO).
FLAM 2:	Aŭgusto 2014:	Pri la movado en Italio kaj en Eŭropo (kadre de AMO 5)
FLAM 3:	Oktobro 2015	Pri la funkciado de Kulturcentro Greziljono (kadre de AMO 15)
FLAM 4:	Decembro 2015	Pri la movado en Sudorienta Eŭropo (kadre de AMO 17)
FLAM 5:	Aprilo 2016	Pri la movado en Danlando kaj Skandinavio (kadre de AMO 24)
FLAM 6	Aŭgusto 2016	Pri la movado en Hungario (ne ligita al AMO)